

**DIO FAROS LAŬ JUSTECO POR SIAJ ELEKTITOJ, KIUJ ALVOKAS LIN –  
Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Luko 18, 1-8

**En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj parabolon, por instrui kiel oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi.**

**Li diris: «En iu urbo estis juĝisto, kiu neniun respektis: nek Dion, nek homojn. En tiu sama urbo estis ankaŭ vidvino. Ŝi iradis al tiu juĝisto insiste petante: “Faru por mi laŭ justeco kontraŭ mia malamiko!”.**

**Dum kelka tempo la juĝisto ne volis interveni; sed fine li pensis: “Kvankam mi neniel timas Dion nek zorgas pri homoj, tamen mi agos laŭ justeco por ĉi tiu vidvino, por ke ŝi ne plu ĝenu kaj turmentu min”».**

**Poste la Sinjoro aldonis: «Vi aŭdis, kion diris la maljusta juĝisto. Nu, ĉu Dio ne faros laŭ justeco por siaj elektitoj, kiuj tage kaj nokte vokas Lin? Ĉu Li longe atendigos ilin? Mi diras al vi: Rapide Li agos por ili laŭ justeco! Tamen, kiam venos la Filo de la homo, ĉu Li trovos ankoraŭ kredon sur la tero?».**

La komenca versiklo de tiu peco, Luko ĉapitro 18, la unuaj ok versikloj, raportas ke *Jesuo diris al siaj disĉiploj parabolon, por instrui kiel oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi*. Nu tiu versiklo povus trompi kaj devojigi la atenton de leganto: ne temas pri instruado pri la preĝo – aŭ pri la insista preĝo – temo kiun Jesuo jam pritraktis – sed pri la realigo de la Regno de Dio.

La instruo de Jesuo pri la preĝo, je ĉapitro 12 de tiu ĉi evangelio estas tre klara. Ĝi estas invito ne maltrankviliĝi, kiel faras paganoj, sed ĉiam esti tute fidaj en la am-agado de la Patro. Jesuo diris: *“Kaj vi ne demandu al vi mem kion vi manĝos kaj trinkos, kaj ne maltrankviliĝu. Ĉiujn tiujn aferojn priserĉadas la paganoj de tiu ĉi mondo, sed via Patro scias ke vi ilin bezonas.”*

Oni do eĉ ne devas peti de la Sinjoro, ĉar la Sinjoro ne venas renkonte al niaj bezonoj, sed li eĉ antaŭas ilin. Sed tio kion Jesuo alprenis en sian koron estas *“Plibone serĉu lian Regnon kaj tiujn aferojn oni donos al vi aldone”*.

Tio estas alprenita de Jesuo al lia koro, kaj tiu estas la temo: la realigo de la Regno de Dio. Kial? Liberigitaj do el ĉiu zorgo tiuj disĉiploj estas invitataj labori por realigi la Regnon de Dio, tio estas la alternativan socion kie anstataŭ amasigi oni kundividadas, kie anstataŭ estri oni sin metas je la servo de la aliaj, kaj pro tio ne necesas supreniri super la aliajn personojn, male necesas subeniri. Tiu estas la Regno de Dio, la alternativa socio kiu estas parto de la projekto de Dio por la homaro.

Pro tio Jesuo ĝin metis en la ununuran preĝon kiun li instruis, Patro Nia, dirante *“venu via regno”*, kiu ne rilatas la venon de io kio ankoraŭ ne ekzistas, sed ion kiu largiĝas kaj etendiĝas. Fakte, pro la fakto ke ekzistas komunumo de personoj, de disĉiploj, de virinoj, kiuj akceptas la beatecojn, la Regno jam estas.

Jesuo diris *“Beataj vi malriĉuloj”*, tiuj kiuj elektis la alternativan socion, *“ĉar via estas la Regno de Dio”*. Li ne diras ke la Regno estos, la Regno estas.

Temas do pri ampleksigo, pri plia etendigo de la efikoj de tiu Regno. Nu, tiu Regno devas largiĝi dank’ al engaĝiĝo de la kredantoj kiuj aktivas por la projekto de Dio super la homaro, kiu estas – kiel kantis Maria en Magnificat – dispeli la fierulojn, renversi la potenculojn de la tronoj kaj resendi la riĉulojn kun malplenaj manoj.

Tion Jesuo volas kaj tion la disĉiploj devas realigi. Tiu estas la Regno de Dio. Pro tiu kialo Jesuo al la fariseoj, kiuj demandas al li mokemaj: *“Kiam venos tiu Regno?”* ĉar ili pensas ke ĝi estas nerealigebla utopio, respondis: *“La Regno de Dio ne venas en maniero kiu altiru la atenton, ne estas io laŭta, sensacia, kiu venas de la supro. Kaj neniu diros: “Jen ĝi ĉi tie” aŭ “Jen ĝi tie”. Jen la Regno de Dio estas inter vi”*.

Estas malgrandaj komunumoj de kredantoj kiuj akceptis la mesaĝon de Jesuo kaj komencas tiun laboron de liberigo de la homaro. Pro tio la nuna peco, tiu ĉapitro 18 de Luko, la unuaj ok versikloj, reprezentas kuraĝigon al la kristanaj komunumoj, la komunumoj de la Regno, kiu povas senkuraĝiĝi, konsterniĝi, sin vidante solaj, fragilaj antaŭ la absurdaĵo de la maljusteco de la socio kiu ilin ĉirkaŭas, kiu estas ilia stilo.

Kaj la preĝo celas la realigon de la justeco de la Regno de Dio. En tio estas la signifo de la insisto de la preĝo. Jesuo certigas: La regno de Dio kaj lia justeco – La vorto justeco en tiu ĉi peco aperas kvar fojojn, tiu estas la centra temo – realiĝos.

Sed por ke ĝi iĝu realaĵo, necesas flanke de la disĉiploj la rompo kun la falsaj valoroj de la socio, rompo kiun la disĉiploj ankoraŭ ne realigis. Pro tiu la peco konkludiĝas per la skeptikeco de Jesuo: *"Tamen, kiam venos la Filo de la homo, ĉu Li trovos ankoraŭ kredon sur la tero?"*

Jesuo parolis pri la alveno de la Filo de la Homo samtempe kun la detruo de Jerusalemo. Jesuo tion diris: tio okazos en la tago kiam la Filo de la Homo manifestiĝos, per la ruino de Jerusalemo, per la detruo de la templo Dio estas iel liberigita kaj do oni ebligas al li iri renkonte al la tuta homaro.

Nu ĉu la disĉiploj, kiam Jesuo manifestiĝos, estos ankoraŭ engaĝitaj en la realigo de la Regno de Dio? La fino de la evangelio de Luko pridubas tion. La disĉiploj ne rompis ankoraŭ kun la valoroj de la socio, ili vizitas la templon - tiel finiĝas la evangelio de Luko – tiun templon kiun Jesuo difinis kaŝejo de ŝtelistoj, kaj la disĉiploj de Emaus rekonas ankoraŭ kiel "niaj aŭtoritatuloj" la murdistojn de Jesuo.

La tuta peco do estas invito ne senkuraĝiĝi por sekvi tiun kiu diris, en alia evangelio, tiu de Johano, "Kuraĝon, mi venkis la mondon!". Kiu engaĝas sin por la vivo tiu estos ĉiam pli forta ol la morto. Kiu engaĝas sin por la lumo, tiu venkos la mallumon.